

Interlingvistikaj Studoj 2005/06, 1a semestro

Literaturo

Nicola RUGGIERO

La sklavo de l' Espero

Kanto de l' Sklavo

Nun mi klare vidas, ke jam sorto mia
estas alligita al vi per kateno,
ke mi nun jam devos ĉiam kun vi iri,
ke mi certe ne sukcesos jam akiri
liberecon, mia nova suvereno!

Multefoje mi forĵetis mian plumon,
eĉ emblemon vian: stelon kvinradian,
en la kor' la fajron mi estingi penis,
sed vi senkompate ĉiam min ekprenis,
kaj min pluen, pluen trenis: sklavon vian.

Al vi apartenas do nun vivo mia,
ĉio, kion jaroj lasis en la koro
vin mi sekvas nune, kiel somnambulo,
tute kontraŭvole, tute sen postulo,
kaj mi jam ne revas eĉ pri laŭr' kaj gloro.

Kie vi ja prenis tiun sorĉan forton?
Vi tra landoj marŝas sen la sang' sur glavo
sen kanonoj, nur kun via verda stelo,
kaj vin malgraŭ tio sekvas sen ribelo
ĉiam novaj, blinde obeemaj sklavoj.

Pli kruelan, ol la famaj uzurpantoj
vi alportis al ni en la mondon moron:
ili piedbatis homajn liberecojn,
de la landoj ŝiris partojn, limojn, pecojn,

sed vi ŝiras el la brustoj nian koron.

La poeto

*Stanislav SCHULHOF (1864-1919), dentkuracisto, verkis ankaŭ ĉeĥe. Kiel originala Esperanta poeto li aperigis tri volumetojn de poemoj: Per espero al despero (1911, 1989); Kion la vivo alportis (1911), Aŭtunaj floroj (1912). Ili enhavis sume tridek poemojn. Lian lastan talenton alte aprezis kaj **Kálmán Kalocsay** kaj **Ivo Lapenna**. Lia lingvaĵo estas facila, bele fluanta, la formo korekta, esprimmaniero impeta. [...]*

En 1922 aperis sub la titolo Bohemaj grenatoj antologieto de tradukoj el la plej bonaj ĉeĥaj poetoj; en ĝi Schulhof montras siajn kvalitojn sur la plej alta ŝtupo.

Schulhof vigle partoprenis la Esperantan vivon en sia loĝloko Pardubice kaj publikigis multajn propagandajn artikolojn.¹

1. Ĉu ampoemo?

Se ni konsiderus nur la unuajn tri strofojn sen la vortoj '*stelo kvinradia*', ni certe kaj sendube pensus pri ama poemo. Sed tio ne estas ama poemo: vole nevole ĝi apartenas al la propagandisma periodo de nia literaturo, kiam la idealoj (ĉikaze: la Interna Ideo) ne nur estis perceptataj sed ofte travivataj pasie. Kaj kiel ĉiuj idealoj ankaŭ la Interna Ideo flamigis la animojn de la unuaj esperantistoj, inter kiuj troviĝis Schulhof kiu sentas sin "*alligita [...]* per kateno" kaj ke "*ne sukcesas jam akiri / liberecon*". La poeto vorton post vorto, rimon post rimo nudiĝas intelektule kaj elideale antaŭ la leganto.

2. La subpremiĝo

Laŭ la unua strofo ŝajnas ke pli ol kanto, tiu ĉi estas lamento de prizonulo; tion povus pruvi iel esprimoj samsemantikaj: "*alligita per kateno*"; "*ne sukcesi akiri liberecon*"; kaj la lasta vorto de tiu ĉi strofo: "*suvereno*", donas al la leganto ian supozitan ideon pri la sopiroj kaj la subpremiĝo kiuj popolis la animstatojn de la poeto. Li sentas sin en prizono ideala, malreala, kaj li volas atingi sendependecon de tia prizono.

Por atingi tion la poeto *forĵetis* tiujn ilojn kiuj estis laŭ li esencaj por lia idealista vivo: la *plumo* uzita por versigi siajn sentojn, ideojn, timojn, dezirojn; la *emblemo*, tio estas la stelo kvinradia, simbolo de ĉiuj esperantistoj disaj tra la mondo kaj kiujn atingis la Interna Ideo de la Majstro. Sed la poeto estas sklavo subpremata de tiu ĉi senkompata forto kiu lin *ekprenis* kaj *pluen, pluen trenis*.

Jen ŝajnaj amdeklaraj vortoj:

*Al vi apartenas do nun vivo mia,
ĉio, kion jaroj lasis en la koro
vin mi sekvas nune [...]*

Sed la poeto poste klarigas, ke li elreviĝis de ĉio kaj sekvas la Ideon kiel somnambulo, kontraŭvole, tute sen postulo. Schulhof konsciis, ke la Ideo estis utopio. "*Sukeraĵo por la*

1 el Tvarožek, Eduard V. (2004): Skizo de la Esperanta Literaturo. Bratislavo, Espero. 73

infaneco" li diris en "**Desperanto**" pri la "*senĉesa homa harmonio, / unu amo, unu familio*".

3. Blanke, ringe, strofe

Saĝe li elektis por la verso la trokeon: ĝi donas ritmon militecan, bataleskan; kaj ankaŭ la vortoj estis taŭge uzitaj kaj rimitaj: ja ne estas hazardo, ke estas tiaj rimoj kiaj *kateno-suvereno, stelon kvinradian-sklavon vian, glavo-sklavoj, moron-koron*.

La rimo [...] havas duoblan efikon, unu sur la senso, unu sur la intelekton.

Sense plaĉas al nia orelo la kunsonoro de du versfinoj. [...] Intelekte, la rimo estas des pli frapanta, ju pli surpriza ĝi estas, t.e. ju pli sence malproksimaj estas la du vortoj, kiujn ĝi kunligas.²

En ĉiu kvin strofoj ĉe la unua verso ni trovas blankan verson, do senrima, kaj poste ringan rimon. La uzo de la blanka verso montras la liberecon al kiu Schulhof strebis dum sia idealista vivo: ĝi troviĝas nur ĉe la komenco de ĉiu strofo, signalo de ĉiama strebado al forelkateniĝo, sed poste li reeniras en la ringan rimprizonon de sia idealo. Ĉio ĉi samvaloras por ĉiuj strofoj; cetero tiuj strofoj ŝajnas esti kunligitaj, laŭ enhavo, inter si sed jene: la unua kun la tria, la dua kun la kvara. Ili estas simetrie similaj kaj la enhavo de unu strofo aludas al tiu de la alia, ekzemple por la unua paro (unua plus tria strofo): "*jam sorto mia / estas alligita al vi*" - "*Al vi apartenas do nun vivo mia*"; "*mi nun jam devos ĉiam kun vi iri*" - "*vin mi sekvas nune*". Por la dua paro (dua plus kvara strofo): "*sed vi senkompate ĉiam min ekprenis, / kaj min pluen, pluen trenis: sklavon vian*" - "*Vi [...] / [...] vin malgraŭ tio sekvas sen ribelo / ĉiam novaj, blinde obeemaj sklavoj*".

Fine la kvina resumas ĉion per drasta konkludo:

Pli kruelan [...] / moron: / Ili piedbatis homajn liberecojn, / de la landoj ŝiris partojn, limojn, pecojn, / sed vi ŝiras el la brustoj nian koron.

Kiel sklavo de l' Espero, tiel li vivis, tiel li poetis.

Bibliografio

"KOPAR" (Kalocsay, Kálmán) en Literatura Mondo n-ro 2, 1922

Tvarožek, Eduard V. (2004): Skizo de la Esperanta Literaturo. Bratislavo, Espero. 73

Auld, William (red.) (1984): Esperanta Antologio. Rotterdam, UEA. 37

Kalocsay, Waringhien, Bernard (1984): Parnasa Gvidlibro. Pizo, Edistudio.